

BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara esperantista asocio

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 2 svisaj frankoj, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Anonctarifo: 1 kv cm. — 1 levon;

korespondo: 1 vorto — 1 levon. Por fremdlando — duoble. Postĉekkonto No 1133

Adreso: str. Alabin, 50. SOFIA, Bulgario.

Jaro XVIII

Januaro-Februaro 1937

7-8

mark April 37

PAZARĜIK,

la kongresurbo de nia XXIV-a kongreso, atendas vin!



La urba parko.

Предконгресни мисли

Малцина иматъ една истинска представа за мнението, което иматъ чуждитъ есперантисти за насъ — българскитъ такива. Вземайки поводъ отъ различни странични факти, както и отъ думитъ на мнозина знайни и незнайни пропагандатори, чуждестраннитъ есперантисти винаги сж смѣтали България блажена страна за есперантското движение, за рай на есперантиститъ.

Отговаря ли това убеждение на действителността? Отчасти — да, и отчасти не. Да — защото нашитъ заслуги въ време на първитъ дни на есперанто сж безспорни, защото нашиятъ народъ е благоприятно настроенъ къмъ идеята ни, защото числото на продаденитъ учебници е действително голѣмо. И не — защото, въпрѣки това, България съвсемъ не е блажената страна за есперанто, нито пѣкъ рай за есперантиститъ. Поскоро тя е адъ: адъ за тия, които трѣбва да ръководятъ движението, групитъ, събранията; за тия, които трѣбва да редактиратъ списание, да събиратъ абонати, членски вноски и т. н.

И този „външенъ рай“, а въ сжщностъ „вжтрешенъ адъ“, не може да остане за дълго време скритъ отъ очитъ на чуждестраннитъ есперантисти. Въ брой 19 на Heroldo отъ 16 май тази година се намира едно съобщение, което не трѣбва да бжде четено отъ онѣзи, които милѣятъ за есперантското движение у насъ, защото ще останатъ дълбоко засегнати. Редакторътъ на Heroldo нищо не е измислилъ. Той само взема поводъ отъ предконгресния отчетъ на Ц. К. за миналата година и констатира, че *отъ 60,000 есперантисти въ България сж организирани само 244*. И отъ себе си прибавя само това, че седмичникътъ Heroldo има въ Бъл-

гария всичко на всичко абонати (колко мислите?) . . . само двама.

Нашата страна е едно своеобразно явление въ историята на есперанто. При една извънредно благоприятна почва за развитие, движението у насъ е толкова слабо, че едва се чувствува. И при 60 хиляди есперантисти ние, въ сжщностъ, нѣмаме есперантисти, защото тия 60,000 никой не ги знае кжде сж и какви сж.

Това е така, защото българскитъ есперантисти сж сигурно най-голѣмитъ индивидуалисти въ свѣта. Струва имъ се достатъчно това, че сж учили или учатъ езика, и че иматъ добро мнение за него. Това е много малко, за да може да се кичи човѣкъ съ прозвището есперантистъ. Не 60,000, ами и 600,000 такива есперантисти да имаме, пакъ движението ни ще продължава да крета. А ако иммахме поне 1500 души организирани, опитни и здрави есперантисти, бихме могли да осжществимъ много отъ ония работи, за които сега можемъ само да мечтаемъ.

Въ надвечерието на конгреса, когато е обичай да се изказватъ разни пожелания за това, което трѣбва да стане, дългъ е на всички, които сж и вжтре и вънъ отъ движението да си кажатъ: „Българскій съидейнико, събуди се! Срамно е, при такива благоприятни мѣстни условия да почивашъ върху бившитъ си лаври и да оставяшъ движението да гине отъ бездействието ти“.

Съ малко усилия, може много да се създаде, стига тия усилия да сж общи. Въ нашата страна има достатъчно есперантисти годни за всѣка една работа. Тѣ трѣбва да се привлѣкатъ къмъ движението и тѣхнитъ сили да се впрегнатъ за работа. Нашето движение трѣбва да достигне до онази висота, която нѣкога е имало, и която пакъ трѣбва да има!



Все още не е късно. Изпрати веднага алиджилото си и се приготви за пжтъ.

Пазарджикъ ви готви изненади!

Адресъ на Лококо: Ив. К. Василевъ, ул. Батакъ, 26.

N. Marangozov

La fluganta vojaĝanto

Vekita
 de la kareso dolĉa, delikata
 de ia suna mateniĝo —
 vi lasu sur la sojlo
 de via dom' modesta
 la triston, la ĉagrenon kaj la zorgon —
 kaj ekkriegu
 kun voĉo tondra:
 ho, grandioza,
 kaj belega,
 ho, senmezura dia mondo!

En tiu tag' benita
 deziras vi traŭri
 tra ĉiuj ĉi direktoj
 la vastan teron,
 kaj la ĉiel' por vi — malalta:
 animo via printempigita
 levigas kvazaŭ flugludilo
 altege al la pura firmamento
 por atingi
 la kanton kaj la liberan flugon de l' alaŭdoj.
 Nun estas vi la gaja vojaĝanto,
 venanta el la malproksimo,
 ĉapelo lia — la brilanta junco,
 ombrelo lia — blusilka la ĉielo.

Jen lin:
 animo — freŝigita en la fontoj,
 rigardo — klara kaj radia.
 Li gastis ĉi matenon
 ĉe la agloj,
 kaj portas al ni la saluton simplan
 de la arbarhakistoj kaj de la turdoj
 Enpaŝas li
 la grenajn kaj papavajn kampojn,
 enspiras la aromon el la sorĉaj herboj,
 trinkas roson,
 manĝas verdaĵon,
 ĝojas al la fungoj ekkreskantaj
 kaj ĉirkaŭprenas la markotojn junajn . . .

Kaj poste,
 sub la ombro de ia ĝiba piroarbo,
 haltigas por ripozi:
 ekaŭdanta
 la dolĉovortan flustron de la folioj,
 la kanton ĉarman de la birdoj
 kaj la sibladon mortan de la serpentoj
 kontraŭ la falĉiloj de la falĉistoj . . .
 — dum ekdormos
 en la varmega forno de l' tagmezo.

Kaj la kampargardisto,
falanta sur la herbon, kiel ĉefanĝelo,
ĵa estas lia konatul' malnova.
Li diras al amiko: «Bonan renkonton!»
kaj dolĉe kun li paroletas
pri la arbaraj reĝoj kaj iliaj kronoj,
pri l' hufoj de la dio Pan,
pri l' silkaj bukloj de l' feinoj,
pri l' milo da amatinoj de ia drako . . .

kaj, kiam la vespero
eklekas lian fruntan kvazaŭ blanka ŝafido,
li longe frotas la okulojn dormemajn,
malĝoje rigardas la velkiĝantan kronon de la horizonto,
kaj lace donas manon por adiaŭ
al la radio lasta de la suno.

Li tiam flugas rapidege
post la lampiroj
sur ĝardenoj,
kamparoj
kaj grenkampoj —
spireganta,
li portas revenante
sian koron riĉan:
plenan korbon
kun fragoj kaj violoj.
kaj disdonadas ilin al ni ĉiuj.

Tradukis: Steki

Bulgaraj popolkantoj

Al Anuĉka-trad

1.

Jana venas el banejo,
forlavita, forbanita
knabo venas el drinkejo
satmanĝinta, satdrinkinta.
Rajdas li ĉevalon viglan
kaj ĉevalon priludigas.
Jen alvenis bela Jana,
Jana lin ameme petas:
„Hej petola ĵuna knabo!
Vi haltigu beston viglan,
ĉar min puŝos, min frakasos!“
Jen trompiĝis knab' petola,
beston viglan tuj haltigas.
Dum li haltis kun ĉevalo,
Jana ŝute al li ŝutas:
„Trovis lupo ŝafon buklan,
sed ne spertas ĵa ĝin manĝi,
trovis knab' knabinon etan,
sed ne spertas ĵa ŝin ami!“

2.

Alrajdis mi en kamparon
herbejon rosan talĉadi.

Mi trovis la karulinon
tie sur fojno dormanta.
Marmoro — ŝia kuseno.
herbaĵo — ŝia sternaĵo,
alteo ruĝa — kovrilo.
Pek-timis mi ŝin ekkisi,
forpasi — forton ne havis,
ĉe ŝi mi dorse kuŝiĝis,
en dolĉan sonĝon droniĝis.
Kiam mi poste vekigis,
forestis la karulino —
ŝi estis malaperinta
kaj sur la ŝtono skribinta:
„Karulo stulta, malsaĝa,
se ami vi ne spertadas,
pro kio vi ĵa komencas?
Kial vi post mi kuŝiĝis,
sed antaŭ mi ne metiĝis,
brak' mia estus kuseno —
per brakoj min ĉirkaŭpreni,
sur lipoj arde min kisi“.

Trad. Iv. Dobrev

Orlin Vasilev

ESTAS MALFRUE

(rakonto)

Oni diras, ke granda estas la mondo! Ke en ĝi estas landoj kaj urboj, kie svarmas vivo, kaj super kiuj simile al fajro-drakoj forflugas la jaroj. Ke tie la homoj kuras, penante atingi ion per etenditaj manoj, sed ĝi ĉiam forkuras ilin, kaj ili mortas, ne prononcante eĉ:

— Dio, dankon al vi!

En nia larĝa valo ne estas tiel. La jaroj, simile al vojaĝantoj, kadukiĝintaj pro laco, pasas sur la polvoplenaj vojoj kaj tiel malrapide iras, ke iam ni volas krii al ili: — Rapidu, pro Dio!...

La instruisto Petrov komence deziris ilin kalkuli, por scii kiom da jaroj forpasas — dek, dekkvin... sed poste eraris la kalkulon, forgesis, kaj ja tio ne estis grava! Lia hararo griziĝis, malgrandaj sulkoj surrampis lian vizaĝon.

Post leciono diskuradis la bruantaj infanaj kompanioj; li turnis lace la ŝlosilon en la lerneja pordo, trairis malrapide la vilaĝan placon kaj, postkiam li rigardis laŭ kutimo la ĉielon kaj la nubojn, li eniris sian ĉambron por atendi la vesperon.

En tiun-ĉi ĉambron antaŭ dudek jaroj li enkondukis sian junan edzinon; tie-ĉi ili travivis sian unuan, sian nuran jaron. Tioma tempo forpasis de tiam, tamen ĉiu objekto en la ĉambro staris la lokon, kiun donis al ĝi la juna virino. Por ŝia rememoro la instruisto ne ŝanĝis la aranĝon. Al li ŝajnis, ke tiel ĝis la fino de sia vivo li sentus ŝian nevideblan ĉeeston.

Ĉi-vespere Petrov atendis gastinon. Post la milito plimultiĝis la infanoj. Plimultiĝis ankaŭ la instruistoj. De du jaroj lia kolego estis la juna instruisto Vâlĉev, kaj hodiaŭ alvenis nova ĵus oficigita instruistino. Ŝin atendis Petrov. Dum du horoj li aranĝis la ĉambron. Li dislokigis la seĝojn, el-tiris el la tirŝranko silkan littukon, per kiu li kovris la liton, kaj la ĉambron plenigis naftalinodoro. Zorgeme li rearanĝis la ilustraĵojn kaj la portretojn, kun malgrandaj lernantoj, sur la tablo, purigis la fenestrojn kaj prenis la balailon. Li deziris ankoraŭfoje finbalai, sed rememoris ion, ekridetis distrite kaj ekflustris: — Nevjana

Stojánova... Poste li silabis: — Nevjana...

Tra la fenestro enblovetis vento kaj blovis la maljunan instruiston per la odoro de la freŝaj plugitaj kampoj. Li rekonsciiĝis. Enspiris profunde kaj ĉirkaŭrigardis la ĉambron: kiel mirinde ĉio estis ŝanĝiginta! La samaj objektoj, la samaj bagateloj kaj malnoviĝintaj portretoj, tamen li tiel aranĝis ilin, ke la ĉambro liberiĝis de la dudekjara kvietiĝinta rezigno. Ĉio en ĝi jam radiis renaskiĝon.

Al li ekŝajnis, ke ankaŭ la spegulo, purigita de la polvo, atendis vidi, respegulita en ĝi, novan vizaĝon, ĵus venintan de ie, helan, ridetantan... Lia rigardo haltis sur la grandigitan virinan portreton ĉe la muro, volvitan per griziĝinta pro la tempo rubando. Estis la portreto de lia edzino, kiu venis post li en la vilaĝon, kaŝitan azile kontraŭ la nordaj ventoj en unu terfaŭkon apud Danubo. Ŝi donacis al li kviete kaj milde unu jaron kaj, kviete kaj milda, ŝi forlasis lin unu printempan nokton. Multajn tagojn li rigardis la okulojn de la portreto, kaj eble ili tenis lin tiom da jaroj en la senbrua dezerteco, sen ia deziro en li, sen ia revo, alloganta lin ien.

— Sed nun estas alia situacio... Io alia nun estas! — malklare flustris Petrov.

— Neoportune: unuan fojon ŝi eniros mian ĉambron.

Li alpaŝis la muron, etendis manon por demeti la portreton, sed la manoj tremetis. Li ekrigardis la okulojn de sia edzino, sed ili — trankvile meditantaj — rigardis ien super lia griziĝinta kapo.

Ekstere la pordo grincis. Hundoj ekbojis. Tra la fenestro aflugis varma kaj malhela kiel la vespero voĉo de fraŭlino:

— Petrov!

La instruisto ektiris rapide la kadron, disŝiris la fadeneton kaj ŝovis la portreton sub la liton. Li ekkuris al la fenestro. Kriis: — Mi venas! Mi venas! Atendu! — kaj vigle elkuris eksteren, lasante la pordojn malfermitaj.

— Bonvolu! Mi petas! Bonvolu! Kian honoron! Tien-ĉi, mi petas, maldekstren!

Li haltis ĉe la sojlo kaj lasis, ke la unua eniru malhelokula, svelta knabino. Poste kuris antaŭ ŝin, ĉirkaŭsvingis emociigita la manon tra la ĉambro:

— Jen estas mia modesta fraŭla loĝejo!

— Fraŭla? — levis maldikajn brakojn la knabino. — Interese! — kaj ruze ekrigardis al Petrov. Sed la brilo de liaj okuloj ne permesis, ke ŝi vidu la sulkojn ĉirkaŭ ili.

— Mi petas, sidiĝu!... — li proponis al ŝi seĝon. — Kie restis Vâlĉev?

— Ian malgrandan okupon li havas. Poste li venos.

— Li ĉiam okupojn havas. Kaj neniam havas tempon por siaj amikoj...

La knabino komprenis la kaŝitan malicon kaj ekmiris per rigardo.

— Vi vidos, vi mem vidos... — kulp-sente ripetis Petrov kaj rigardon direktis flanken.

— Mi ne deziris diri malbonon pri li aldiris baldaŭ li. — Bonega junulo li estas, tamen ne taŭgas kiel kamarado. Kelkopo estas ni, la pli inteligentaj homoj en la vilaĝo, sed ŝajne li neglektas nin. Li vagas kun la fiŝkaptistoj, ĉasadas kaj kiam krepusko alvenas pli frue ol li, li dormas en la ŝafkabanoj. Matene lia vestaĵo odoras fojnon, kaj en lia hararo taŭzas pojleroj.

La instruistino ekridetis. La rideto ĝojigis lin.

— Ja mi diris: vi mem vidos! Li ne taŭgas kiel kamarado! Tamen, rekompence de tio, vi, tie-ĉi, en tiu-ĉi modesta, malgranda ĉambreto.. Tie-ĉi vi ĉiam trovos.. amikon.

Lia voĉo kadencis, tamen ne pro malforteco, sed pro io granda kaj varma, kio radiis el la okuloj de la junulino kaj, samtempe kun la vespero, karesis lian animon.

— Tie-ĉi sen amiko ne estas eble. Al ni baldaŭ venas la noktoj. Niaj danubaj noktoj. Sur la rivero naĝos la glacioj. Tiam, se vi volas, venadu al mi. Ni hejtos la fornon, ni sidos... — li ne sciis, kion plu diri. — Ni sidos kaj trinkos teon! — ekkriis li kaj ekridis. Lian vizaĝon kovris sulketoj.

— Kaj jen: mi havas ankaŭ librojn... Petrov alpaŝis la breton, prenis libron kaj ĝin frapis per mano.

— Polvokovritaj ili estas... — ekridis li. — Delonge mi ne trarigardis ilin. Kaj kial mi legu en tia soleco, kiam mi ne povas interŝanĝi du vortojn kun iu. Sed nun estos malsame: vi estas ĉe ni!

Lia voĉo laŭtigis: — Ni ambaŭ legos! Ni trinkos teon kaj legos!

La knabino ĝoje ekridetis.

— Ĉu vi komprenas, sinjoro Petrov, por mi ĉio estas tiel interesa! Vi min komprenos: unuan jaron! Kaj kiel agrable al mi estas, ke mi vin renkontis! Vi estas sperta, vi konas la vivon — vi min gvidos, vi min instruos.

— Jes... jes, jes... — flustris Petrov.

Li fermis okulojn kaj imagis, ke vere li multe vivis, konas la vivon: li ŝin gvidos...

Jes... Ho kiel bone ni vivos. Laŭ rusa maniero! Kiel estis ĉe Ĉehov? — La samovaro bruetas... la plumoj grincetas... Jes, jes! Ho, bonege estos!

Agrable al li estis: li plaŭdigis la manojn kaj provis sin dancturni en la ĉambreto.

— Kia forto estas en vi! — vigle komencis la junulino. — Kaj kiel agrable vi parolas. Mi supozis renkonti iajn malbonajn kaj malicajn homojn, sed mi renkontis tiajn bonajn, afablajn, sincerajn... Kiel agrable estos ĉe vi!

La instruistino ĉirkaŭrigardis la ĉambron.

— Tre simpatia anguleto. Ĉiam mi revis pri simila ĉambreto.

— Ĉu vere?..

— Jes, jes — ĉiam. Sed kio estis tie sur la muro? De kio estis tiu granda, flava makulo?

Petrov konfuziĝis.

— Nu.. bildo. Unu bildo estis.

— Kaj vi ĝin formetis?...

— Jes, ne delonge.

— Kial?

— Nu... malnova bildo estis. Nekonvena por la nova tempo — implikite klarigis li.

— Avĉjo! Hej, avĉjo! — ekkriis laŭte iu de la strato. La hundoj furioze bojante grupiĝis ĉe la pordon.

— Vâlĉev! Fine! — ekkrietis ĝoje la instruistino. Ŝia vizaĝo ekflamis je ruĝaj makuloj.

— Kiom vi ekĝojis! — kun dolorplena voĉo ekflustris Petrov. — Mi ne supozis, ke mi estas malagrable.

— Sinjoro Petrov, tio estos peko!—ekskuis hararon la knabino. — Kial vin kaptis tia penso! Kontraŭe, mi tiom ĝojas, ke vi traktis min tiel..

Ŝi ne povis klarigi La pordo estis puŝita, kaj ĉe la sojlon, spiracula pro la kurado, ekstaris korpulenta junulo, kun sunbrulita, nerazita de kelkaj tagoj vizaĝo kaj malsupren tegita kasketo.

— Ho, ci.. — kaj kapskue riproĉis lin la junulo.—:Por mi vi ne eliros renkonte. Mi scias, jes ci triumfus aŭdante, ke min hundoj disŝiris. Nu, fraŭlino Stojanova, ni iru! Ekiru, ĉar ni malfruos.

— Kien? Kien vi tiel ekrapidis? — maltrankviliĝis Petrov.

— Kial do — kien? Ĉu Stojanova ne diris al vi kien ni iros?

— Ho, jes.. mi forgesis — mallevis okulojn la instruistino.—Mi estis ĝenata diri. Vâlĉev ekridis.

— He, he! Antaŭ la avĉjo vi ne devas vin ĝeni. Sur Danubo, avĉjo, ni remos. Malmultajn similajn noktojn ni disponos — krimo estos, se ni ellasos ilin. ■

La juna instruisto parolis tondre Lia voĉo la flamon de la lampo tremigis. ■

— Avĉjo! — neatendite ekkriis li kaj streĉis brovojn. — Kion ci faris? ■■■■

— Kion? — time ekrigardis Petrov.

— Kial ci formetis la portreton de la edzino?

— Mi...

— Mi, mi! — senkompate skuis kapon Vâlĉev kaj ĉirkaŭrigardis la ĉambron. — Ho, lia moŝto, kiel li aranĝis ĝin. . Sed la portreton, la portreton kial vi formetis? Ĉu ci forgesis kiom da fojoj vi ploradis por tiu sanktulino, kiel vi mem ŝin nomis? Kien vi metis ĝin? — kriis la junulo kaj svingis manon antaŭ la paliĝinta, konsternita vizaĝo de Petrov.

— Vi devas vidi, fraŭlino, kian mirindan edzinon li havis!

— Sed tie, tiu flava makulo ĉu estas de la portreto de lia edzino? — demandis kviete la instruistino.

— Jes. Kaj certe okaze de via alveno li ĝin formetis. Petrov, donu la portreton, por ke ĝin vidu la fraŭlino.

— Ĉu vi deziras? — obtuze demandis Petrov kaj sin klinis por eltiri la portreton elsub la lito.

Vâlĉev kaj Stojanova silente sin ekrigardis.

Petrov etendis la portreton.

— Jen estas ŝi...

Lia mano tremis forte: li donis la kadron al Vâlĉev kaj komencis aranĝadi la librojn.

Vâlĉev starigis la portreton sur la ŝrankon, depaŝis kaj montris la ikone palan vizaĝon.

— Nu, diru: ĉu tiu portreto devas resti sub la lito?

— Vere, kia belulino! — flustris la knabino. — Kaj vi, sinjoro Petrov, ree alkroĉu ĝin. Tio ne estas... tro malnova bildo.

Petrov nek turnis sin al ili, nek prononcis ion: ja la libroj delonge ne estis purigataj.

— Nu, fraŭlino, ekiru! — ekkriis Vâlĉev kaj ekridis. — Lasu avĉjon, ke li ordigu la librojn.

■ — Mi ne volas ke ni iru solaj — flustris Stojanova.

■ Ŝi ĉagreniĝis pripensante, ke ili sin amuzos kaj Petrov restos sola en la nokto, klinita super la malnova portreto. Vâlĉev daŭrigis krii, sed la knabino ne cedis, kaj li konsentis.

— Nu, avĉjo, venu ankaŭ ci kun ni.

— Venu, sinjoro Petrov — flate petis la fraŭlino. — Se vi ne venos, mi ankaŭ ne iros.

— Kial? Kial do? Mi ne deziras malhelpi.

— Al kiu, pro diablo, ci malhelpos? — ekkriis Vâlĉev. — Venu, jen ĉio!

— Venu, sinjoro Petrov.

Petrov obeis. Survoje Stojanova estis afabla al li. Ŝi prenis lin sub brako kaj senĉese babilis al li. Ŝi volis nepre tuj ellerni la kanton, kiun liaj lernantoj ĉimatenes kantis. Varma forto transfluis per ŝia mano en la malfortiĝintan korpon de la maljuna instruisto. La sonoj de la vigla infana kanto forigis la pezon de la jaroj; kiam ili eniris la boaton, Petrov preskaŭ akiris novan humoron.

— Vi vidos... — ekpensis li kaj insistis sidiĝi ĉe la remiloj. Vâlĉev ridetis en la mallumo kaj cedis.

Danubo, kolektinte la akvojn de la riveroj en multaj landoj, larĝe sin sternis en la nokto, kaj de la malproksima nevidebla bordo blovetis malvarmeto kaj ia timiga forto, pro kiu oni sin sentis malgranda kaj malforta.

— Remu, avĉjo!

Petrov dekroĉis la ĉenon kaj frapis la remilon en la akvon. La fluo kaptis la boaton kaj ĝin ektrenis preter la bordo.

— Remu, avĉjo! — ekkriis Vâlĉev kaj, kiu scias kial, al la maljuna instruisto ŝajnis, ke estas moko en tiu vigla ekkrio.

Lia kapo facile eksvenis pro la rapida kurado de la akvo, sed li per ĉiuj fortoj komencis remi. La pinta nazo de la boato komencis malrapide sin ŝovi preter la malluma bordo.

Lin ekregis ia krueleco: pruvi al tiu-ĉi memfida jnnulo, ke li ankoraŭ multan forton havas. Pro la malvarmo kaj la premado de la remiloj liaj manfingroj komencis rigidiĝi, sed li ne sentis tion kaj per ritmaj frapoj daŭrigis remi.

Super la montetoj de Rumanio ekrampis la granda lunglobo. Ĝi haltis momente en la horizonto, respegulis sin dormeme en la akvon kaj, facile eksaltinte, ekglitis en la sereno. Ekestis mistera silento. La ondplaŭdado kvietiĝis, la kampoj mutiĝis — ekregis lunluma danuba nokto.

Petrov frapadis la remilojn. Sed tro malproksima estis la tempo, kiam li per fortaj manoj movigis la boaton kun sia juna edzino, kaj poste, por ne rememori tiujn plej belajn noktojn de sia vivo, malofte li tuŝis remilojn. Per ĉiu nova frapo li sentis perdon de fortoj. Ŝvito resumis lian frunton. Ankoraŭ momenton — la remiloj ekpendos simile al flugiloj de mortpafita birdo, la boato revenos malantaŭen.

Tamen tio ne devis okazi. Li sufokspiris — sensona, obstina, senforta.

Subite Stojanova leviĝis.

— Sinjoro Petrov, mi petas vin... haltu! Al vi ne estas bone. Haltu, pro Dio!

Petrov ne aŭskultis ŝin — premadis la remilojn.

— Vâlĉev! — sin turnis ŝi al la juna fraŭlo. — Se vi ne prenos la remilojn, mi revenos!

Ŝia voĉo estis severa.

— Ho, avĉjo! — ridetis Vâlĉev. — Donu

al mi... Sidiĝu, fraŭlino, por ke vi ne renversu la boaton.

Vâlĉev alrampis la lokon de Petrov kaj prenis de li la remilojn.

— Mi volas eliri... mi forirus... direktigu flanken! — apenaŭspire flustris Petrov.

Vâlĉev forte frapis la maldekstran remilon, kaj la boato ŝanĝis sian direkton al la bordo. Ankoraŭ du ekremoj, kaj la sablo eksiblis en ĝia fundo. Ili helpis al Petrov, ke li eliru.

— Revenu ankaŭ ni, — proponis Stojanova.

— Ne, ne, mi petas... Vi promenu: la nokto estas bela. Mi sola.. volas... — lace li ilin konvinkis.

— Sed vi iru hejmen, — flate konsilis la instruistino. Vi povas malvarmumiĝi.

— Jes, jes.. sed vi promenu.

Per lastaj streĉoj Petrov puŝis la boaton al la rivero. Baldaŭ la ritma plaŭdo ĝin ekportis rekte kontraŭen al la insulo.

— Ĝis revido, avĉjo! — surglitis la akvon la krio de Vâlĉev, kaj al Petrov denove ŝajnis, ke estas moko en ĝi. Li rifuĝis en la ombron de la salikoj kaj longe rigardis la malaperantan boaton.

La luno supreniris ankoraŭ pli alten. Danubo per kvieta plaŭdado verŝis siajn akvojn. De malproksime alflugis kanto. La sama vigla infana kanto.

— Ili min forgesis, — malĝoje pensis Petrov kaj ekiris sur la sablo.

En lia ĉambro la lampo malforte lumetis. Petrov staris iomete, ĉirkaŭrigardis la dezertan ĉambron kaj prenis la portreton. Li surstaris seĝon kaj kunligis la disŝiritan fadeneton: la flava makulo estis kovrita.

— Estas malfrue.. — ekpensis la maljuna instruisto, poste li kuŝiĝis sur la liton kaj rigardis la portreton. Sed, eble pro tio, ke la fadeneto estis mallongigita pro la rekunligo, la okuloj de lia edzino ne plu rigardis lin, sed ien flanke en la malhuman angulon.

Tradukis L. M.

● На 15. юний 22.30 ч. ще говори предъ микрофона на радио София съидейникътъ Кирилъ Дражевъ на тема: „Пазарджикъ, градътъ на изобилнитъ стопански култури и 24-ятъ есперантски конгресъ“.

● Въ следния брой ще се отпечататъ имената на всички съидейници, които сж подарили суми за есперантски домъ и за фондъ „Пропаганда“.

HUMORA PAĜO

Esperantistaj tipoj

Ekzistas diversaj homoj en la mondo,
 tial ankaŭ en nia verda rondo
 ekzistas diversaj tipoj
 kun diferencaj principoj.

Kelkiuj sin okupas per poŝtmarkkolektado
 aŭ per senkulpa korespondado.
 Ĉu por praktiki esperanton?
 Ne! por trovi amanton!

Unuvorte: senkulpec' naŭva,
 dolĉemotiva!

Sed ekzistas esperantistoj de alia speco
 Kun malpli da senkulpeco.

Ili okupas sin per propagando,
 eĉ en eksterlando:

laŭ bezono

ŝanĝas koloron kaj nomon
 kaj lerte eltrompas monon;
 kelkiam eĉ okupas sin per prediko
 pri mistiko kaj etiko,
 sub kiuj sin kaŝas ciniko
 kaj erotiko.

Unuvorte: tipoj danĝeraj,
 sen dub' degeneraj . . .

Pli amuzaj estas tiuj fervoruloj,
 stranguloj,

kiuj anstataŭ propagandi-nur altrudas,
 kiuj ofte mem esperanton nur balbutas
 kiuj havas planojn kuriozajn,
 propraopinie — grandiozajn.

Unuvorte: oni lasu ilin imagi,
 ke sole ili scipovas agi.

Ekzistas ankoraŭ tipoj interesaj

strangimpresaj,

ilin ho ve!

ne gvidas la ide',

sed io pli konkreta

kaŝe sekreta,

ekzemple ni diru: prezidanta posteno

aŭ iu alia ordeno.

Unuvorte: inspiron donas ambicio,
 antaŭen pelas la envio.

Ekzistas ankoraŭ tipoj,
kiujn prezentu,
ne atentu
estus plej bone.

Ili sindone
nur intrigas
kaj aliajn tion fari instigas.
Unuvorte: ilin sen timo
ni honoru per malestimo.

Ekzistas tiuj diversaj tipoj —
kun „noblaj principoj“
ne nur en nia lando malgranda.
sed en la tuta mondo esperanta
en kvanto
sufiĉe granda.

Do — ĉu ne estas stulte kaj kompromite,
se la esperantistoj opinias sin elito,
homoj de pli alta kvalito?
Unuvorte: jam formortas
„la interna ideo“,
inter si batalas la pacarmeoj.

Ho, verduloj, verduloj!
Unue ni kulturu nian propran rondon,
nur tiam povos venki ni la tutan mondon.

Tra nia kalejdoskopo

Reveninte de Plovdiva foiro, nia fervora kaj fame konata sofia samideano s-ro Āsen Ĝrigorov raportis en plen-plena ŝalono de la esperanto-domo, antaŭ pursangaĵ sofianoj, pri siaj impresoj de la foirurbo kaj speciale pri la esperantomovado en Plovdiv. Impresis al li forte la fakto, ke spite al la oficialaj informoj de la Centra komitato de B. e asocio pri manko de abonantoj de „Bulgara esperantisto“, esperantistoj estas ofte renkonteblaj, eĉ pli ofte, ol en la ĉefurbo mem tamen, la plovdivaj samideanoj ne konas unu la alian. Laŭ la kompetenta opinio de nia tre ŝatata samideano Ĝrigorov, ĝuste tio estas la kaŭzo de la anemia esperanto-vivo en la dua bulgara ĉefurbo. Post la kutima aplaŭdo, la plimulto el la ĉeestantoj—malnovaj sofiaj indiĝenoj, montrante al la parolinto, demandis min kaŝsekrete: „Estu afabla samideano, bonvolu informi nin, kiu estas tiu-ĉi sinjoro, certe li ne estas sofiano!? . . .“

La esperanto — domo en Sofia estas regule kaj amase vizitata de freŝbakitaj esperantistoj, kiuj serĉas malnovajn samideanojn por praktikaj celoj . . . Ĉar la domo estiĝis tro malgranda la komitato de sofia societo intencas baldaŭ inviti la du jam konatajn detruemajn samideanojn: Poŝka kaj Hesapus (Smetkarev, laŭ la nova baptonomo), por plivastigi la domon . . .

Laŭtradicie ankaŭ tiun ĉi jaron ni festas la tagon de la libro. Dum tiu-ĉi tago ĉiuj bonaj kaj inteligentaj butikistoj estas morale devigataj uzi por enpakado nur presitan paperon por . . . certigi la debiton de la libro.

Antaŭ 40 jaroj trafite de kuglo falis Aleko Konstantinov — la patro de la moderna bulgara felietono kaj aŭtoro de „Baj Ĝanju“. „Baj Ĝanju“ mortpafigis sian aŭtoron. Kiu estas kulpa? Ĝerte Aleko, ĉar li mem elpensis tiun „heroon de la mallumo“.

XXIV. BULGARA ESPERANTO-KONGRESO, PAZARGIK 19—22 de JUNIO 1937.

Bulteno № 2

Karaj gesamideanoj!

Tiun ĉi jaron la pazarĝikaj geesperantistoj havas la grandan honoron renkonti la bulgarajn kaj la eksterlandajn gesamideanojn kaj aranĝi la jaran esperantofeston — la XXIV-an nacian esperanto-kongreson. La geesperantistoj de ĉiuj partoj de Bulgarujo kolektiĝos por interŝanĝi pensojn, raporti pri tio, kion ili faris dum la pasinta jaro, pridiskuti diversajn demandojn pri la bona prospero de esperanto kaj esperantismo, montri la vojon sur kiun ni devas antaŭeniri por atingi nian celon kaj batali por la paco kaj la interfratiĝo de ĉiuj popoloj.

La bona rezulto de la kongreso dependas ekskluzive de nia bona propagando kaj nia bona esperanta eduko. La ĉeesto de la fervoraj kaj la agemaj geesperantistoj hodiaŭ estas pli ol necesa por montri la pravecon de nia movado. Pro tio ni bezonas ne nur vortojn, sed ankaŭ agojn.

Ni estas certaj, ke ĉiuj geesperantistoj komprenos bone la signifon de nia laboro kaj venos amase al la kongreso, subtenante kaj fortigante la kolonojn de la pacaj batalantoj.

La pazarĝikaj geesperantistoj laboras vigle por la bona preparo de la kongreso, sed ankaŭ estas necesa morala kaj materiala apogo de ĉiuj geesperantistoj. Jen pro tio ni petas vin sendi viajn aliĝilojn senprokraste kaj viziti multnombre Pazargikon.

KONGRESA PROGRAMO

- Sabate, 19. junio. Renkonto de la gekongresanoj. Vespere interkonatiĝa renkonto en „Lovnia dom“.
- Dimanĉe, 20. junio. Antaŭtagmeze solena malfermo de la kongreso, en la granda salono de legejo „Videlina“. Posttagmeze komunaj fotografadoj, promenadoj. Vespere kongresa amuzvespero.
- Lunde, 21. junio. Kunsidoj de Bulgara esperantista asocio.
- Marde, 22. junio. Ekskurso al Laĝene-Ĉepino-banja. Iro kaj reveno per vagonaro 54 lv.
- Fakaj kunsidoj: Jam anoncitaj: Internacia movado UEA—IEL. Esperanto-lektoroj. Literaturo kaj Redaktado „B. E.“.
- Loĝejoj: Lito en hotelo lv. 20—30. Komuna loĝejo lv. 5—10.
- Kongreskartoj: Dissendataj al ĉiuj aliĝintoj.
- Kongresafiŝo: La kongresa afiŝo estas belega grandformata, dukolora. Dissenditaj al ĉiuj societoj.
- Veturado: Por la kongreso Bulg. ŝtat. fervojoj permesas 50% rabaton. Veturado per specialaj formularoj № 14, vendataj ĉe ĉiuj stacidomoj. Detalojn oni trovu en la asocia cirkulero.
- Esperanto t-aĵo: Esperanto teatraĵo ne okazos, pro diversaj kaŭzoj. La gesamideanoj estas petataj (kiuj venos al la kongreso) prepari ion — versaĵojn, humoraĵojn ktp. por la amuza vespero.

Karaj gesamideanoj! Tempo por pripensoj kaj atendo mankas. Jam vi devas prepari vian valizon kaj ekveturi al la kongresa urbo. La pazarĝikaj esperantistoj plenumis sian devon! Nun estas via vico. Se vi ne povos veni, ni tre bedaŭros, sed ne forgesu almenaŭ saluti la kongreson.

Tutkoran kaj fratan bonvenon!

Lo. Ko. Ko.

Todor Samodumov

Lingvo kaj kulturo

Greka proverbo diras: „Parolu, por ke mi vidu vin!“ Kiam Horaco konsterniĝas vidante la spiriton de Hamleta patro, li nekomprene demandas; „Kiu vi estas? Parolu!“

Ĉu ne sufiĉas vidi la homon, por ekkoni, kiu li estas? Ĉu la homon oni vidas, nur kiam li parolas? Kiom multe da aferoj ni bone konas, se eĉ ili ne parolas al ni! La naturo staras morte kaj pasive, tamen, la homo sukcesis ĝin malkovri kaj ekkoni en ĝiaj plejsekretaj esencoj.

La ekkono de l' homo, tamen, sen ĝia parolo, estas nebla. La homaj deziroj, celadoj, pensoj kaj idealoj estas desegnataj en la lingvo. Per ĝi oni sin malkaŝas por alies observo. Sen lingvo, sen parolo oni estas morta, sen moviĝanta figuro, ridinda, fremda kaj sensenca! „Parolu, por ke mi vidu vin!“ estas apelo por malkaŝo, signalo por ke la aktoro aperu sur la scenejon de la vivo.

Post la kulisoj de l' mimiko kaj de la gesto, malantaŭ la ekrano de la silento, la vivanta homo estas senanima ombro. Kiam ni demandas ĉi ombron: „Kiu vi estas? Parolu!“ — ni volas, ke levigu la kurteno, post kiu videbliĝas la hom-ombro.

Hodiaŭ la popoloj estas ludantaj ombroj unuj por la aliaj. En sia reciproka

interkomunikiĝo, ili sin demandas: Kiu vi estas? Parolu! — por ke ili ekkonu sin. Ĉu oni respondis ĉi demandon? Ĉu la popoloj ekkonis unu la alian? . . .

Ne! Eĉ nun ili alarme sin demandas: Kiu vi estas? Parolu! Bedaŭrinde, la popoloj staras mute unu kontraŭ alia, kaj iliaj mimiko kaj gestado, la ĝoja akcepto de fremdaj tradukoj kaj ĵurnalistaj interjekcioj — estas ombroj de la popola animo, senigita je la eblaĵo sin malkaŝi senpere kaj rekte.

La kulturo bolas kaj sin disverŝas vane, ne utiligate kaj ne interŝanĝate de la popoloj.

Ankoraŭ ne estas konstruita larĝa ponto inter la popoloj, por interŝanĝo de kulturo kaj de interhelpo. Ankoraŭ staras la popoloj mute unu kontraŭ la alia, ankoraŭ ili estas fremdaj, nekonataj, ne malkaŝitaj, kaj tiam sin demandas: „Kiu vi estas? Parolu!“

Kiam la popoloj ekparolos, kiam ili sin malkovros unu al la alia, sen la falso de la traduko, sen la perado de la preso kaj de l' diplomatio?

Tiam, kiam ili ekparolos unu al la alia rekte, vizaĝ-al-vizaĝe. Kiam ili aperos al la kultura kaj ekonomia borsoj sole, sen tradukistoj kaj perantoj, kiam ili ekparolos la saman lingvon.

Esperanto tra la mondo

Презъ време на последните олимпийски игри въ Берлинъ, езиковата проблема причиняваше голѣми трудности. Напримѣръ, въ цѣла Германия не можеше да се намѣри преводчикъ на гимнастическата терминология на участвуващите държави. Сега ще се направятъ постѣпки, за да се използва по възможностъ найшироко приложението на esperanto въ бъдещите олимпийски игри въ Токио презъ 1940 год.

* *

Въ Япония е произведена интересна анкета между кандидатите-депутати за японския парламентъ. 143 кандидати сж

се изказали за esperanto. Отъ тѣхъ 78 сж спечелили въ изборите и днесъ сж депутати въ парламента, между които двама бивши министри и единъ бившъ председател на Долната камара. Поради специалните обстоятелства, въ които се намира „страната на изгрѣващето слънце“ въ езиково отношение, идеята за единъ международенъ неутраленъ езикъ лесно намира много поддръжници и последователи.

* *

Администрацията на държавните желѣзници въ Чехословакия, която на нѣколко пѣти издаде множество илю-

стровани брошури и проспекти на есперанто, сега отново е издала голѣми афиши съ есперантски текстъ за привличане туристи-чужденци въ страната и специално въ провинцията Jiĉin и Rokogo de Prachov.

* * *

ENIT, официалното италианско бюро за пропаганда и туризъмъ, току що е издало нова брошура на есперанто. Брошурата съдържа 96 страници съ ценни упътвания за ж. п. билети, влакове, цени на хотелитѣ, пансионитѣ и др. необходими данни за туриститѣ.

* * *

Въ Будапеща освенъ банка Ungaritaliana, която отъ миналата година въведе официално есперанто въ своята кореспонденция и служба (за което бѣ съобщено въ В. Е.), сега Hungara ĝenerala kreditbanko, която има клонове въ всички по-голѣми градове въ Унгария, сжщо е въвела есперанто. Сжщата

е издала проспекти на есперанто и пощенски карти съ изгледъ на грандиозното банково здание и текстъ на унгарски и есперанто.

* * *

Американскиятъ сказчикъ г. I. R. Scherer отъ Лосъ Анжелосъ, току що завърши своето 9 месечно турне изъ Европа. Той е посетилъ 12 страни и почти всѣки день е държалъ сказки на есперанто на най-различни теми и специално за Холивудъ. Той притежава препоръжки отъ много американски университети.

* * *

Есперанто въ Дания намира всѣки день все нови и нови последователи. Повече отъ 3000 души днесъ учатъ есперанто, обучавани отъ 11 души преподаватели предимно чужденци. Обучението се води по методата Cseh.

Известия на централния комитетъ

Благодарение постѣпкитѣ на Централния комитетъ, Министерството на търговията, промишленостъта и труда издаде окръжно, съ което се разрешава факултативно изучаването на есперанто въ срѣднитѣ търговски и промишлени училища.

Това окръжно нека се има предъ видъ отъ дружествата, които трѣбва да съдействуватъ за откриване курсове въ горепоменатитѣ училища.

МИНИСТЕРСТВО

на

търговията, промишленостъта и труда

Дирекция на търговията и промишленостъта

№ V. 73. 6113

ОКРЪЖНО

София, 8 априль 1937 год.

До г. г. директоритѣ на срѣднитѣ търговски и промишлени училища.

Ако при училището ви има ученици, желаещи да учатъ есперанто и има подготвенъ преподавателъ да води обучението, разрешава се, въ такъвъ случай, факултативното изучаване на тоя предметъ въ свободното за ученицитѣ отъ учебни занятия време, безъ да се плаща лекторско възнаграждение на преподавателя.

Преди почване на занятията да се уведомява Министерството за името на лектора, броя на желаещитѣ да изучаватъ есперанто, отъ кои класове сж и по кое време ще се води обучението.

Директоръ: (п) Д-ръ К. Бобчевъ

Началникъ на Отдѣлението за търг. и пром. образование: (п) Г. п. Апостоловъ

Ni ĝoje sciigas pri la grava sukceso, kiun ni atingis. Dank' al la klopodoj de la Centra komitato de BEA, la Ministerio de la komerco, industrio kaj laboro eldonis la ĵenan ĉirkuleron:

MINISTERIO
de la
KOMERCO, INDUSTRIO kaj LABORO
Direkcio de la komerco kaj industrio
№ V. 73. 6113

CIRKULERO

Sofia, la 8. de aprilo 1937.

Al s-roj direktoroj de la mezgradaj komercaj kaj industriaj lernejoj.

Se ĉe via lernejo estas lernantoj, dezirantaj studi esperanton, kaj se estas kompetenta instruisto por gvidi la lecionojn, en tia okazo estas permesata fakultativa instruado de tiu ĉi lernobjekto en la tempo, en kiu la lernantoj estas liberaj de studokupoj, sen pago de lekto rekompenco al la instruanto.

Antaŭ ol komenci la lernon, informu la Ministerion pri la nomo de la lekto, la nombro de la dezirantoj lerni esperanton, de kiuj klasoj ili estas kaj en kiu tempo okazos la lecionoj.

Direktoro: D-ro K. Bobĉev

Faktestro de la komerca kaj industria instruado: G. p. Apostolov

Както е известно вече, двадесет и четвъртият ни конгресъ ще се състои тази година отъ 19. до 21. юний въ Пазарджикъ, града на изобилнитѣ стопански култури.

По този случай Главната дирекция на желѣзницитѣ и пристанищата съ писмо № III 21—326 отъ 12 май разреши на делегатитѣ и гоститѣ на конгреса да пътуватъ съ **50% намаление**, като на сѣщитѣ отъ 16. до 19. юний вкл. ще се издава по единъ билетъ по редовната тарифа до Пазарджикъ, важащъ и за връщане отъ 21. до 24. юний вкл., следъ като билетътъ се завѣри на гара Пазарджикъ.

Билетитѣ ще се издаватъ срещу бележка обр. № 14 отъ гарата и лична карта съ портретъ, като при връщането бележката ще трѣбва да се завѣри на гърба отъ конгресното бюро, че лицето е участвувало въ конгреса. Безъ тази завѣрка билетътъ ще бѣде невалиденъ за връщане.

**

Седмото издание на учебника «Курсъ по есперанто за българи» е напълно изчерпано.

Ако нѣкои съидейници има да направятъ нѣкои бележки и препорѣжки, които да се иматъ предъ видъ за осмото издание, умоляватъ се да ги изпратятъ до автора: Атанасъ Д. Атанасовъ, ул. Гладстонъ, 48—София.

Поправка

Въ брой 5/6 год. XVIII сп. „Bulgara esperantisto“ на стр. 9, въ езиковитѣ бележки (обяснения по запитването на Г. М. — Шуменъ) сѣ допустнати нѣколко сѣществени грѣшки, поради неясность въ самия рѣкописъ и бързина въ коригирането на списанието. Тия грѣшки сѣ:

Въ алинея III (втора колона): вмѣсто *kiu vi vidas*, да се чете *kiom vi vidas*.

Въ алинея IV (сѣщата колона): вмѣсто „и обикновено въ такъвъ случай се *подрежда*“ да се чете „и обикновено въ такъвъ случай се *подразбира*“.

Въ сѣщата алинея: вмѣсто „ще докопатъ ябълкитѣ и безъ *книга*“ да се чете „ще докопатъ ябълкитѣ и безъ *стѣлба*“.

Въ сѣщата колона въ примѣра „Тiu, *kiu venos, li povas elekti* и пр.“ следъ думата „*venos*“ е изпустната думата „*unue*“.

Молимъ читателитѣ да извинятъ редакцията за тия неволно допустнати грѣшки и да ги поправятъ.

**

На запитванията, които нѣкои съидейници отправятъ до Централния комитетъ относно 30-ия международенъ есперантски конгресъ, отговаряме, че на нѣколко пѣти Централниятъ комитетъ

е изпращалъ делегации до г. министра на Народното просвѣщение, комуто е вржчвано обстойно изложение, въ което се изтъква ползата — морална и материална — която страната ни ще има отъ уреждането на този конгресъ. На последната ни постъпка М-то на нар. просв. съ писмо № 1604 отъ 14. априлъ отговори, че М-то не е намѣрило за сега за удобно да сезира министерския съветъ съ молбата на съюза.

ĜIS NUN ALĜIS AL LA KONGRESO LA JENAJ GESAMIDEANOJ:

- | | | | |
|-----|-------|--------------------------|---------------------------------|
| 28. | s-ro | Ilija Grigorov, | v. Proslav, Plovdiva r. |
| 29. | " | Stojan Iv. Bakarov, | " " |
| 30. | " | Asen Grigorov, | Sofia |
| 31. | " | Georgi Popjanev, | Dolna-banja |
| 32. | " | Atanas D. Atanasov, | Sofia |
| 33. | " | Stefan Kirajiev, | " |
| 34. | " | Ljuben Marikin, | " |
| 35. | " | Mladen N. Mladenov | " |
| 36. | " | Nisim Altalion | " |
| 37. | " | Svilen Sokolov, | " |
| 38. | " | Stefan Radev, | Ruse |
| 39. | " | Grozdan K. Lušev, | v. M. Konare,
Pazarĝika reg. |
| 40. | " | Dimitr Jonov, | Ruse |
| 41. | " | Vasil Petrov | " |
| 42. | " | Ljuba kaj Stefan Ganĉevi | Sofia |
| 43. | f-ino | Nadja Petroviĉ | " |
| 44. | s-ro | Boris Golemanov | " |
| 45. | " | Georgi Hâršev | " |
| 46. | " | Radoslav K. Triĉkov | Vraca |
| 47. | " | Aleksandr Dinkov, | v. Klimentovo,
Plovdiva reg. |
| 48. | " | Hajos P. Jhász, | Balkany Hungarujo |
| 49. | s-ino | Hajosné P. Jháš, | " |
| 50. | f-ino | Maria Dulcba Jhász, | Balkany
Hungarujo |

DEZIRAS KORESPONDI

S-ro Georgi Donĉev, str. Gurko, I — Târnovo,, Bulgario — interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-ro Atanas Marinov, str. Moderni damove, 3 — Ruse, Bulgario.

S-ro Van Weeren, Heemstedestrato 11-e, Amsterdam W, Nederlando.

S-ro C. Prins, Sneeuwbalstrato 70, Amsterdam, Nederlando.

S-ro J. Blok, Vespuccistrato 61, Amsterdam, Nederlando.

NIA VIVO

Asenovgrad. Depost la mezo de marto esp. societo aranĝis ĉiusemajnajn kunvenojn — merkrede vespere — pri-traktante lingvajn demandojn.

Kjustendil. Societo „Flamo“ renoviĝis sian agadon. Je la 7-a de aprilo okazis ĝenerala kunveno kaj oni elektis la jenan komitaton: prez. Todor Ĉernev, sekr. kasisto Mihail Petrov kaj kons. Asen Vasev. Kontr. komitato: Isak Haravon, Ĥr. Pejĉev kaj Mosko Davidov. La kunveno proklamis kiel honoran prezidanton la malnovan samideanon Jvan Mirovski.

Sofia. La 15-n de marto antaŭ mikrofono de radio Sofia nia s-ano Georgi Dimov parolis je temo „Eŭropaj vojaĝantoj tra Bulgarujo dum la XV kaj XVI jarcentoj“. La paroladoj antaŭ radio fariĝas pli kaj pli interesaj. La efiko inter la enlanda kaj eksterlanda aŭskultantaro pligrandiĝas.

— La 14-n de aprilo, en la ĉiuse-



Pazarĝik Radianoj en la urba parko.



majna merkreda kunveno s-ano Kiril Drajev referis je la temo: „La difino de la semajnotago laŭ donita dato“. La ĉeestantoj kun granda intereso aŭskultis la varian kaj detalan priskribon de la maniero trovi tuj la nekonatajn semajnotagojn laŭ tute praktika kaj facila matematika vojo. Fine ĉiuj mem provis apliki la novellernitan metodon.

— La 15-an de aprilo parolis antaŭ mikrofono de radio Sofia nia s-anino Nadja Petroviĉ je temo „Malnovbulgaraj ilustritaj manuskriptoj“. Jen kiel la radio jam praktike enkondukas esperanton en la ĉiutagan vivon. Radio kaj esperanto helpas unu al la alia. Ili estas idoj de unu kaj sama epoko kaj neceseco.

— Ĉe la societo stariĝis es-to ĥoro, gvidata tre lerte kaj entuziasme de s-ano Uzunĝaliev. La 17-an de aprilo nia ĥoro aranĝis printempan amuzvesperon en la granda salono „Uĉitelska kasa“. La sezono jam ne favoris tiajn vesperojn, sed malgraŭ tiu malhelpanta kondiĉo, la salono estis plenigita amase. Sofiaj gesanoj sentas la neceson vivi pli aktive kaj efike propagandi nian ideon. La programo estis sperte elektita kaj bone plenumita. Regis gajaj kaj amikecaj horoj. Impulsiga sukceso.

— La 21-an de aprilo s-ano G. Dimov aranĝis „Viva gaseto“-n. Kelkaj el la multaj ĉeestantoj partoprenis. Iuj deklamis, aliaj legis ricevitaĵajn leterojn aŭ malgrandajn rakontetojn k spritaĵojn. Tiuspecaj kunvenoj donas al la s-anoj la eblecon amase partopreni, ĉu per propre verkitaj literaturajoj, ĉu per tradukaĵoj. Same la humoro ĉiam estas freŝa kaj plivigliĝita.

— La 21-an de aprilo en nia regula kunveno partoprenis Johan Sighartner — aŭstriano, kiu nuntempe oficas ĉe la fame konata budapeŝta eldonejo „Literatura mondo“. Skize li priskribis antaŭ la kunvenoj kelkajn aventurojn el sia veturado de Budapeŝto al Sofia. Li venas en Bulgarujon kun speciala tasko konatigi kun la lokaj cirkonstancoj, kaj se eble aranĝi filialon de „L. M.“.

Dum la sama vespero s-ano Emil Stratev prelegis pri la nuna stato de U. E. A. kaj I. E. L. Ni subtenu la ambaŭ organizaĵojn.

Târnovo. La 16-an, 27-an kaj 28-an de aprilo okazis en nia urbo konferenco

de la direktoroj kaj instruistoj el la komercaj gimnazioj.

Je la nomo de Bulgara esp. asocio kaj Esp. societo „Lumo“, salutis la konferencon nia malnova kaj fervora samideano s-ro Zlatev. Bondezirante fruktodonan laboron li esprimis dankon al la prezidanto de la konferenco s-ro Georgi pop Apostolov, fakestro en la Komerca ministerio pro la grava paŝo, kiun faris la Ministerio enkondukante esperanton en la komercajn kaj profesiajn lernejojn. La bela kaj konvinkiga parolado faris bonegan impreson al ĉiuj ĉeestantoj, kiuj tondre aplaudis.

Okaze de la konferenco, vizitis nin s-ro Georgi Dimov el Varna, kiu raportis al ni pri la esperanto-movado en la ĉefurbo.

— En la komerca gimnazio sindone laboras niaj samideanoj, la instruistoj s-ro Tjutjunktov kaj s-ro Andreev. En ia knaba gimnazio rezultiĉe laboras nia malnova esperanto pioniro s-ro Bâĉvarov.

— Sukcese finiĝis la kurso de nia senlaca samcelano s-ro Ŝiŝkov. La novaj kaj malnovaj esperantistoj regule renkontiĝas en dolĉaĵejo „Cvetkov“. Post la kongreso okazinta en nia urbo, oni konstatas grandan plivigliĝon.

Varna La malfermita je la 13-a de novembro kurso por komencantoj sukcese finiĝis. La 23-an de marto en intima rondo oni aranĝis modestan hejmfeston. Parolis nia prezidanto s-ro Petrov, kiu per sia bela kaj sincera parolo, sukcesis gajni multe da novaj anoj por la esperanto-movado.

La ekssekretario s-ro V. Julzari longe parolis kaj priskribis la evoluon kaj la signifon de la internacia lingvo—esperanto.

Fine, oni disdonis al la novaj gekursanoj esperantajn librojn, kiel donacon.

La novajn geesperantistojn ni devis allogi en nian societon, tial oni malfermis kurson por progresintoj, gvidata dufoje en la semajno.

La kurso estas senpaga, nur la gekursanoj devas ani en nia societo.

V. Zlatna Livada — Ĉirpana regiono. La nova societo „Verda stelo“ elektis la jenan estraron: prez. Ŝiŝman K. Boĉev, vicpez. Marĉo K. Marinov, sekr.-kasisto Mitju Najdenov kaj membro-kons. S. V. Stefanov.